

**NSiR - Nova Sento in Rete  
N. 1067 (37/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet  
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet  
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,  
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Nia "Gustumado" ĉe la revuo de UEA..... 2
- L'etimologia delle radici in Esperanto..... 3
- Nubo ne plu nubumas, sed... ..... 3
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton..... 3
- Pillole di Salvezza 1067: Giorgio Canuto ..... 4

### Eventoj

# Atendante la venontjaran Italan Kongreson... Eblas almenaŭ gustumi ĝin!

■ Sara Spanò

Jam de pluraj jaroj, la Itala Kongreso de Esperanto estas aparta landa kongreso: ĝin karakterizas ne nur vasta gamo da altkvalitaj programeroj, sed ankaŭ plursence internacia dimensio, laŭ deveno kaj agadnivele kaj de la kontribuantoj kaj de la partoprenantoj.

La ĉi-jara kongreso en Asizo (itale: Assisi) estis prokrastita ĝis 2021 pro la nuntempa sankrizo, sed tio ne dampis la agademon de Itala Esperanto-Federacio, kiu proponis la okazon – dum la sama semajno de la ĉi-jare neokazinta kongreso (23-a – 29-a de aŭgusto) – de reta "Gustumado de la Itala Kongreso", en la kadro de la unua Monda Festivalo de UEA. Ĉiutaga duhora programo, dum kiu estis prezentitaj diversspecaj eroj, kaj por varti la komunumsenton kaj por proponi iaspecan "kompandion" de la Itala Kongreso, aparte al tiuj, kiuj ankoraŭ ne partoprenis tiun aranĝon kaj ne konas ĝian kutiman formulon.

Kiuj estis la ĉefaj ingrediencoj de tiu ĉi antaŭplado?

**Klerigaj kaj pensigaj prelegoj kaj prezentoj:** Ivan Orsini pri Raffaello, kies 500-an forpasdatrevenon oni memoras ĉi-jare; Duncan Charters pri diversaj ecoj de "komunikado: interpersona, informa, transkultura, konfliktsolva"; Renato Corsetti, tre interese anticipante la venontjaran kongresan temon, pri "Sankta Francisko kaj la lupo: paco kaj milito en la nuna mondo".

**Literaturo kaj muziko:** ekde 2017, Itala Esperanto-Federacio okazigas tradukan konkurson (kaj pri poezio kaj pri prozo); krome, omage al

la fama kantisto Gianfranco Molle, forpasinta fine de 2018, ĝi lanĉis konkurson por kanzonoj originale verkita en Esperanto. La premiadon gvidis Carlo Minnaja, nelacigebla antaŭeniganto de kulturaj iniciatoj.

Speciale por verkemuloj, Anna Löwenstein proponis atelieron pri verkado, kun praktikaj ekzercoj.


Okazis muzikaj prezentoj, enkondukitaj de Riccardo Lamperti, dum kiuj kelkaj inter niaj plej konataj artistoj (Grazia Barboni, Chiara Raggi, Piero Nissim, Anjo Amika, Ĵomart kaj Nataŝa), kiuj laŭplane koncertos venontjare en Asizo, regalis la spektantaron per siaj kantoj.

**Ekskursoj, nemalhavebla elemento:** Laura Brazzabeni, vicprezidantino de Itala Esperanto-Federacio kaj sperta organizanto kaj gvidanto de dumkongresaj ekskursoj, akompanis la partoprenantaron tra la ĉefaj vidindaĵoj de la kongresa regiono, Umbrio, per informriĉaj kaj agrablaj virtualaj ekskursoj.



Laura Brazzabeni

**Agadinstigaj programeroj:** Françoise Noireau kontribuis per prezento pri Lingvaj Festivaloj, kiuj tuŝas la aleksteran agadon por kaj per Esperanto.



Debora Rossetti, Michela Lipari

Krome, kadre de la temo de la Monda Festivalo – la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj –, okazis rondtablo, sub la gvido de Humphrey Tonkin, kaj kun kontribuoj de aktivuloj, kiuj interesiĝas kaj diversrole agadas pri UN kaj Unesco (Giorgio Novello, Cesco Reale, François Lo Jacomo, Sara Spanò), kun la celo informi, debatigi kaj mobilizi agademulojn subtene al la celaro de UN diversnivele (loke, lande, internacie).

Se pluuzi la kuirartan metaforon, harmoniigis la ingrediencojn por krei la finan antaŭpladon du tre lertaj "kuiristinoj", kun diversaj spertoj kaj talentoj: Michela Lipari, prezidantino de IEF, kiu vigle kunordigis la tuton kiel reĝisoro, kaj Debora Rossetti, estraranino de IEF pri komunikado, kiu tre atente kaj efike prizorgis la teknan flankon.

Atendante la 87-an Italan Kongreson (Asizo, 20-a – 27-a de aŭgusto 2021), kaze de akriĝanta apetito, iru frandi la tutan gustumadon ĉe la Jutub-kanalo de Itala Esperanto-Federacio: <https://mallonge.net/6g>.

Elkorajn dankojn al Sara Spanò, kiu aperigis tiun ĉi artikolon pri nia "virtuala" Kongreso.

## L'ETIMOLOGIA DELLE RADICI IN ESPERANTO

Lunedì 30 novembre, alle 18:00 Giorgio Denti terrà in lingua italiana una conferenza dal titolo: "L'etimologia delle radici in Esperanto, un viaggio alla scoperta di molte curiosità". La conferenza avverrà sulla piattaforma *Zoom* al seguente link:

<https://us02web.zoom.us/j/84245125623> ID riunione: 842 4512 5623

Chiunque è benvenuto. Per qualsiasi informazione o problema anche di natura tecnica potete contattarmi: [debora.rossetti.1611@gmail.com](mailto:debora.rossetti.1611@gmail.com)

## NUBO NE PLU NUBUMAS, SED...

Saluton nubumanto!

Pro tro da nesolveblaj problemoj de *Nubo* (socia retejo en kiu vi estas membro) mi decidis fermi ĝin je la fino de la jaro. Sed ĝi ne estas la fino, ĉar mi jam kreis novan socian retejon nomate *Mia Vivo*.


*Mia Vivo* estas bazita de alia programo kaj mi ne povas movigi viajn konton kaj bildojn en tiu retejon. Vi bezonas krei novan konton kaj alŝuti ĉion tien. Vi ankaŭ bezonas elŝuti ĉiujn de viaj informoj kaj bildoj el *Nubo*. Mi volas danki vin por esti membro de *Nubo* kaj uzis ĝin ĝis nun, kaj mi esperas ke vi volas fariĝi membro de la nova retejo. Dankon *Nubo* kaj saluton *Mia Vivo*!


<https://miavivo.net>

Johannes Genberg, la retejestro de *Nubo* kaj *Mia Vivo*

## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

Uno dei posti più classici dove trovare errori di traduzione è il menù di una rosticceria etnica: qui l'errore è doppio, perché è sbagliata anche quella inglese. Un amico tatuatore mi racconta di persone che, credendo di avere nobili frasi in ideogrammi eleganti, portano invece "Involtino primavera" o peggio.





### PILLOLE DI SALVEZZA 1067: GIORGIO CANUTO

Il 29 ottobre è l'anniversario della morte (nel 1960) del professore universitario di medicina legale ed eminente esperantista Giorgio Canuto (1897-1960)  
[it.wikipedia.org/wiki/Giorgio\\_Canuto](http://it.wikipedia.org/wiki/Giorgio_Canuto).

Rinviamo alle pagine di Wikipedia, ed alleghiamo la p. 110 della rivista "L'Esperanto" 1962-6, con un necrologio in forma di elegia di Marjorie Boulton.



*Vin vivantan mi honoris;  
hele tagis tia nuno;  
mortan, vin mi ne priploris.  
Noĝtas. Kaj subiras suno.*

*Manon vi lastfoje swingis...  
Vinodoras glas' malplena.  
Vi strebadis kaj atingis.  
Oras la ŝalado grena.*

*Homojn ame vi pacigis.  
Kreskas junaj olivarboj.  
Al laboro vi instigis.  
Daŭre varmas grizaj ĥarboj.*

*Kontribuis vi al sci'.  
Birdoj nestis — birdoj nestos...  
Scion diskonigis vi.  
Longe tiu scio restos.*

*Sur la tombo velkas laŭro,  
kaj tretita ter' pasivas.  
Ĉio ŝajnas daŭro, daŭro;  
via verĥo vin postvivis.*

*Plena vivo, vivplenumo;  
rozobero sekvas rozon.  
De la luno, jen sunlumo.  
Vi meritis la ripozon.*

Marjorie Boulton

Se komandus arlekeno, kiel buntus la cxielo?  
Milkoloraj flikoj por forigi la malhelon.  
Se gxanduĵa regus ja la sxtaton  
Sukeraj domoj tuj, kun pord' el cxokolado  
Pulcxinelo estro? Laux la nova legxo  
Novan kapon havu la malgxentila